

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

eĥoj tutmondaj

el Odessa (Ukrainio)

Mi esprimas profundan kondolencon: S-ino Aida Yayoi ja vere estis literature dotita persono kaj tre bona, bonkora homo. Mi kontaktis kun ŝi dum mia restado en Jokohamo, kiam ŝi organizis mian viziton kaj prelegon en lernejo, kaj poste ŝi patrinece zorgis pri mia lernantino Julia, kiu vizitis Jokohamon post mi laŭ invito de Hama-rondo. Tatjana Auderskaja, Odessa

el Samarkando (Uzbekio)

Kun ega malĝojo mi informiĝis pri forpaso de via multjara aktivulino s-ino Aida Yayoi, kiu estis elstara esperantistino kaj fidela vivkunulino de same meritplena Hama-Rond-ano s-ro Aida Kiyoshi.

Mi kaj miaj familianoj tutanime esprimas al ĉiuj parencoj kaj samrondanoj de Yayoi-san niajn elkorajn kaj profundajn kondolencojn.

Hela memoro pri Yayoi-san por ĉiam restos en niaj koroj...

Kunsente viaj, Anatolij Ionesov & familio

el Ŝanhajo (Ĉinio)

Koran dankon pro via mesaĝo kaj informo!

Certe via gazeto "Novaĵoj Tamtamas" tre plaĉas al mi, ĉar mi povas bone informiĝi pri Jokohama E-agado. De tempo al tempo mi transraportis al niaj samideanoj pri Jokohamo. Mi elkore dankas vin pro viaj gazetoj, kiujn mi ricevis antaŭe.

Salutas miajn geamikoj el Jokohamo!

sincere via WANG Minhao

Niaj klasoj

***Eseoj:** gvidas Doi Hirokaz, ĉe la Muzeo, en sabato (horoj ne fiksitaj).

El la infanlibroj tradukitaj de la vaska lingvo, oni finlegis "Klaŭda kaj la rivera sekreto" de Aitor Arana.

El la esearo "Tamen ĝi moviĝas", oni eklegis "La literatura vivo de Esperanto: La elektoj de Zamenhof por tradukado".

***Teksantoj:** gvidas Doi Ĉieko, per Zoom, en lundo de 16:00 ĝis 17:00

Nun unu kursano. La klaso legas rakonton de Vasilij Eroŝenko. Post "Stranga kato", nun legata estas "Lumo kaj Ombro".

***eriko:** gvidas Doi Ĉieko, ĉe la Muzeo, en merkredo de 13:30-15:30. Oni daŭre legas la japanan literaturajn "La Pordego" de Nacume Sooseki, tradukitan de Doi Ĉieko.

***Jokohama Salono:** sen gvidanto, per Jitsi, en sabato 15:00-17:00. Daŭre kiel en somero, principe la 1-an kaj la 3-an sabaton de monato oni legas "La Ŝtona Urbo" – pli ol 80 procentoj finlegitaj ĝis oktobro. La 2-an sabaton oni komune legas sian liberan frazfaradon, kaj la 4-an sabaton oni montras sian tradukaĵon el materialo libere elektita.

***Daŭriga kurso:** gvidas Doi Ĉieko, ĉe la Muzeo, en nefiksita tempo, al unu lernanto. En septembro kaj oktobro oni legis el la gazeto "Esperanto" de UEA.

En oktobro fokusita estis la raporto pri la nova oficejo de Esperanto-Ligo en Israelo en Tel-Avivo.

Ĉu “pago senkontanta” resanigus mian ŝultron?

NAMBA Fumiharu

Same kiel nunaj multegaj homoj, mi ĉiam kunportas mian saĝtelefonon. Ja, ĝi bonege funkcias ne nur kiel telefono, sed kiel retumilo, fotilo, videoludilo, tradukilo... ktp. ktp. ktp. Jen estas magia tabulo! Kaj nuntempe oni povas pagi monon per tiu “magitabulo”. En Japanio, la “Elektronika Mono *Suica*” gajnis ĉefan popuralecon, tamen ankaŭ “*PayPay*” estas ofte uzata precipe en malgrandaj restoracioj kaj tavernoj. Mi prefere uzas tiujn pagmanierojn per saĝtelefono.

Lastatempe, mi rimarkis ke malpli kaj malpli ofte mi pagas per “reala mono”. Kiam mi butikumas, kiam mi manĝas en restoracio aŭ kafejo, kiam mi deponas vestaĵojn al lavbutiko, kiam mi trinkas ĉe la vendiloj de trinkaĵoj..., preskaŭ ĉiam mi pagas per kartoj aŭ saĝtelefono. Restas nur kelkaj ejoj, kiuj nur akceptas realan monon.

Jam longe, eble ekde kiam mi estis studento, mi kunportis monujon en la dekstra poŝo de pantalono (La maldekstra poŝo estis por mantuko). Tamen, nuntempe mi malfermas mian monujon nur kelkajn fojojn monate. Mi rekonis ke jam malaperis bezono kunporti monujon ĉiam en poŝo. La plej profunda loko en mia sako estas sufiĉa por la monujo!

En lasta monato mi ĉesis enmeti la monujon en mia poŝo. Ĝi estis mia longa kutimo, tial komence mi sentis maltrankvilon. Sed post unu semajno mi sufiĉe kutimiĝis al tiu nova kutimo. Kaj mi sentis plu certe ke mi treege malofte bezonas monujon.

Nun, mia dekstra poŝo de pantalono liberiĝis. Kion mi faru sekvante?

Jam longe, eble ekde kiam mi aĉetis mian unuan poŝtelefonon, mi kunportis ĝin (poste saĝtelefonon) en la poŝo de ĉemizo. Tamen, nuntempaj novaj saĝtelefonoj pli kaj pli grandiĝas. Poŝo de ĉemizo estas jam tro malgranda por modaj saĝtelefonoj.

Kiam mi sufiĉe kutimiĝis kun la kutimo sen monujo en poŝo, mi ŝanĝis la lokon por mia saĝtelefono al la poŝo de pantalono. Ankaŭ ĝi estis granda ŝanĝo de mia longa kutimo. Sed post unu semajno mi sufiĉe kutimiĝis.

Nun, mia poŝo de ĉemizo liberiĝis. Rezulte,

kio okazis?

Jam longe, eble ekde kiam mi eklaboris kiel komputila inĝeniero, mi havis malagrablecon aŭ pezon en mia ŝultro. Tamen, nuntempe la ŝultro resaniĝas iom post iom. Mi lasas mian ĉemizpoŝon libere, kaj la pezo de saĝtelefono, kiu longe tiris la ĉemizon kaj la ŝultron, jam malaperis.

Mi iomete surpriziĝis, ke mia prefero al “pago senkontanta” finfine rezultus resaniĝon de mia ŝultro!

Ne plu kazino en Jokohamo

Sibayama Zyun’iti

En la marta n-ro de 2019 (n-ro 346) de tiu ĉi gazeto mi raportis kun la titolo “Ĉu kazino en Jokohamo”, ke ekzistas plano inviti kazinon (vetludejon) en Jokohamo. Tiu plano estis forte iniciatita de tiama urbestro de Jokohamo, s-ino Hayasi Humiko. Sed okazis elekta voĉdono de urbestro en aŭgusto 2021, kaj ŝi estis venkita. La nova urbestro, s-ro Yamanaka Takeharu, klare kontraŭis inviton de kazino jam de la kandidatiĝo. Li jam fermis sekcion por iniciati kazinon en Jokohamo, kaj ne plu nia urbo havos kazinon. En Japanio, estas ebleco, ke aliaj 2, 3 municipoj ankoraŭ planas enkonduki kazinon en sia urbo.

Niaj planoj

Zamenhof-Festo de Gubernio Kanagawa

Tio okazos en la posttagmezo de la 12a de decembro per reto, uzante programon zomo (zoom). Esperanto-Societo de Kawasaki preparas diversajn programerojn. Niaj rondanoj aŭ hejme partoprenos aŭ kunvenante en la Muzeo partoprenos.

Jarkunveno en 2022

Nia NPO Esperanto-Jokohamo havos jarkunvenon en la 30a de januaro 2022. Tio estas la plej supera decidorgano de nia NPO, okazanta unu fojon jare. Ni planas tiam efektive kunveni en nia Muzeo.

La knaboj de Jakoo (1) (矢向の少年たち)

Tanigaŭa Hiroŝi

Mi rememoras la knabojn de Jakoo, Curumi, Jokohamo, kun kiuj mi dense rilatis en 1998~1999 ĉe Aktiva Centro de Jakoo, Jokohama. Tiam mi laboris tie kiel ĝia estro.

Tiutempe ĉe Jakoo-Mezlernejo furiozis lernantoj; perforto, rompadado, fumado, bruego dum la lernohoro. Jakoo-Mezlernejo estis distingita el inter “furiozaj lernejoj” en Jokohamo. Fine du el la lernantoj estis arestitaj kaj senditaj al la Observejo por Knaboj (少年鑑別所) por 3 semajnoj.

Tiuj mezlernejoj envenis en nian Aktivan Centron. Ili bruegis, malicpetole malhelpis niajn stabanojn, kaŝe fumis, ktp. Aliaj gastoj embarasiĝis. Mildaj riproĉoj estis ofte ignoritaj. Rigoraj alrilatoj povus vekti perforton. La stabanoj ĉagreniĝis. Mi starigis du principojn:

① Ni komprenu la malĝojon kaj solecon de la knaboj kiuj malfacile povas havi “sian lokon” en la lernejo.

② Ni konfidu ilian homecan koron kiun ili mem esence enhavas profunde en sia sino. Rilatu al la knaboj kun amo kaj pacienco.

Iuj opiniis min tro cedema. Mi havis ankaŭ trejnajn kunsidojn invitante fakulon pri la “deliktaj geknaboj”. Mi konstatis, ke niaj stabanoj pene rilatadis kun la knaboj kun amo.

Ni provis tre diverse:

(1) Unu semajnon antaŭ la komenciĝo de la somera ferio ni aranĝis “vespermanĝan kunvenon” kunvokinte 8 triajarajn t.n. fiknabojn. Ni montris al ili “Specialan Someran Lernoprogramon”:

4-foje semajne, 2-horojn ĉiufoje

3 instruistoj

La knaboj ĝojege manĝegis viandaĵojn. Sed la rezulto restis senfrukta. Neniu, neniam aperis en la preparita leciono.

Similaj projektoj ankaŭ restis senfruktaj.

(2) Iun tagon al mi venis informo ke du knaboj fumas en gimnastikejo. Mi rapidis al la loko. La knaboj neis al mi fumadon. Mi kaj la knaboj interkonsentis: Kaj ili, kaj mi neniam plu fumos. Rezultis, ke nur mi perfekte ĉesis fumadon, kion miaj familianoj delonge deziregis vane.

(3) Iun tagon unu knabo sternis sin surdorse sur la gasto-kanapo. Trifoje mi ripetis milde; “Eliĝu”. Li suprenrigardis min kun defiaj okuloj. Post 1-2-minuta atendo mi tiregis liajn gambojn. Li alsaltis min, puŝis mian gorĝon, tiregis mian kravaton. Li kriis; “Ĉifiĝis la pantalono kiun mi aĉetis por 15000 enoj por mia kromlaboro”. Aliaj samgrupanoj ĉirkaŭis nin. Post kelkaj minutoj ili foriris.

(4) Kiam la du knaboj liberiĝis de la Observejo por Knaboj ni havis por ili “Gratulan Festenon” ĉe Ĉina Strato por anticipi t.n. “Gratulfestenon por Liberiĝo” fare de la samgrupanoj.

(5) La knaboj deziris okazigi sian propran koncerton ĉe nia gimnastikejo. Mi akceptis tion du-foje kondiĉe ke ili organizu plenumkomitaton. Ili bone organizis la koncerton.



(6) Iun tagon mi kunvokis la knabojn kaj disdonis al ĉiu krajonon kaj paperon dirante “Skribu poemon pri io ajn”.

Ili nur bruis kaj tuj foriris.

Ĉirkaŭ semajnon poste abrupte aperis du knaboj dirante; “Donu al ni krajonon kaj paperon. Ni skribos poemon.” Ĉirkaŭ 1 horon poste ili foriris doninte al mi poemojn. La poemoj estis infancaj sed tre kortuŝaj. Mi sendis al ili leteron kun mia impresio pri la poemoj. Kelkajn tagojn poste alia knabo venis al ni dirante “Ĉu vi legos ankaŭ mian poemon?” Kaj sekvis aliaj “poemoj”. Mi redaktis iliajn “poemojn” broŝurete 「矢向少年詩文集」 kun la titolo; “Eblas skribi ion ajn, ekde nun.” el la tankao de Taŭara Maĉi:

まだ何も

書かれていない

日記帳

何でも書ける
これから書ける

En taglibro
nun ankoraŭ
blankpaĝa restanta
skribeblas io ajn
skribeblas ekde nun.



Kenĉjo

Kiam mi rememoras la knabojn de Jakoo, “Kenĉjo” vekas min pri unu specifa sento.

Li estis unu el la membroj de la friponknaba grupo de Jakoo. Estanta plej juna kaj plej malgranda el inter la grupanoj, li ĉiam estis kvazaŭ “vosto” de la grupo. Kiam la grupanoj faris ian malican petolaĵon, li ĉiam senfare kuretis tien, reen. Kaj kiam la grupanoj forkuris, ankaŭ li kuris kiel ĝia vostaĉo. Aminda knabo li estis.

Iun tagon okazis afero memoriga al mi kun li.

En tiu tago mi estis kiel kutime deĵoranta ĉe la Aktiva Centro. Unu viro, unuavide senhejmulo, en malpurega vestaĵo kun malbonodoro venis en nian domon. Li sidiĝis en la salono. Pro troa malbonodoro la aliaj kunsidantoj deiĝis. Tia fenomeno okazis ankaŭ en la antaŭtago. Antaŭan tagon la viro restis ne longe, kaj la malbonodoro restis ne longe. Sed hodiaŭ! La viro iom pli longe

ŝajnis resti. Unu alia vizitanto venis al mi kaj postulis ian solvon. Mi devas anonci al la viro foriri, mi pensis.

Mi alproksimiĝis al la viro kaj diris ke li sekvu min. Mi gvidis lin tra la koridoro ĝis la angulo. Mi rimarkis, ke Kenĉjo okaze trovis nin kaj sekvas nin. Mi proponis al la viro seĝon. Ankaŭ mi sidiĝis kaj diris al li: Pardonon, sed bonvolu ne veni ĉi tien de morgaŭ. La viro senvorte ekstaris kaj foriris.

Observinta ĉion Kenĉjo fikse rigardis min kaj diris: “Tro Kompatinde al li!” En liaj rigardoj kaj vortoj mi sentis ardon de indulgemo, kompatemo kaj malĝojo. Kenĉjo tuj foriris plu mute.

Poste mi enpeniĝis. Jes! Vere, Kenĉjo ja pravis! Mi estis tro pigra, eĉ malkuraĝa! Mi devis diri al tiu kompatinda viro, ke li venu denove morgaŭ. Tiuokaze mi povus kunvoki miajn stabanojn kaj peti iliajn helpojn. Tiam ili volonte proponos al la viro uzitajn vestaĵojn lavitajn. Kaj kiam la viro venos la sekvontan tagon, ni kondukos lin rekte al la gimnastikejo, kie li povas duŝi kaj vestiĝi en pura vestaĵo.

Tiel li povis senĝene sidi en la salono. Tian solvon mi devis havi!

Kenĉjo per sia naiva kaj nature humaneca intueco rekte atentigis mian malhumanecon.

Mi rememoras ofte kun rimorso kaj kun karega sento al Kenĉjo, knabo de jakoo.

(daŭrigota)



La dekstra estas Kenĉjo.